

BULTENO de REU

№ 91, Oktobro 2017

REU establas la fonduson

«Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»!

Laboro pri vortaro estas malfacila tasko, kiu postulas multajn fortojn kaj monelspezojn. Dum longaj jaroj Boris Kondratjev kun nemultaj helpantoj abnegacie faras tian laboron, kreante plej uzatan hodiaŭ Esperanto-rusan kaj rusan-Esperantan vortaron (<http://eoru.ru>, <http://rueo.ru>).



Ni proponas subteni ilian laboron pri la vortaro kaj pri ĝia paĝaro kaj establas fonduson por tio.

Vi povas donaci kiom vi volas, ekzemple 10, 100, 1000 rublojn, aŭ iun alian sumon, kiu ne estos tro peza por via monujo.

Ei multaj donacoj kunmetiĝos forta subteno. Aliĝu ankaŭ vi!

Kolektatan monon ni regule sendados al la teamo de Boris Kondratjev.

La nomojn de donacintoj ni planas regule publikigi en «Novaĵoj» en la REU-paĝaro (<http://reu.ru/informoj/eo>).

Viajn mondonacojn ĝiru al la kasisto de REU.

Post la ĝiro nepre skribu al la kasisto retroŝt- aŭ SMS-mesaĝon, en kiu indiku, kiu vi estas kaj ke vi

ĝiris monon en la fonduson por Kondratjev-vortaro.

Pagmanieroj kaj kontaktoj de la kasisto vidu ĉe

http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj_eo.html.

Provizoran regularon pri la Fonduso vi povas elŭti ĉe

http://reu.ru/prenu/regularo_pri_kondratjev_fonduso.pdf.

Teksto de tiu ĉi novaĵo ĉe reu.ru: <http://reu.ru/informoj/eo/231>;

ruse: <http://reu.ru/informoj/ru/232>

Provizora regularo pri la fonduso de REU

«Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»

La regularo devas esti aprobata aŭ abolita de sekva Konferenco de REU. Ĝis tiu okazos, la Estraro provizore uzas ĝin por kuranta agado.

1. La fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» (plue — la Fonduso, la Vortaro) estis establita de la 29-a Konferenco de REU (06.-07.08.2017, urbo Poŝeĥonjo).

2. Celo de la Fonduso — monhelpi al la teamo de la Vortaro en ĝia laboro pri la Vortaro kaj pri la paĝaro de la Vortaro. La monhelpo okazas per akumulado de mondonacoj.
3. La Fonduso ne estas uzebla por aliaj celoj.
4. La Fonduso pleniĝas per donacoj de apartaj esperantistoj, Esperanto-organizaĵoj, ceteraj simpatiantaj personoj.
5. Listoj de kontribuintoj al la Fonduso estas regule publikigitaj en la paĝaro de REU kaj en la Bulteno de REU.
6. Donaco al la Fonduso fareblas per pago al kasisto de REU. Paganto devas nepre informi la kasiston, ke la pago destinitas al la Fonduso.
7. REU regule transdonas la tutan akumulitan en la Fonduso monon al la teamo de la Vortaro (ne malpli ofte ol ĉiun duonjaron, escepte de okazoj, kiam sumo en la Fonduso estas nula). La transdono okazas per ĝiro laŭ monsubtenaj pagmanieroj, indikitaj en la paĝaro de la Vortaro.
8. La Fonduso povas esti malfondita per decido de la Konferenco de REU aŭ per decido de la Estraro de REU, aprobita de la Konferenco de REU.

Aranĝoj



Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburgo

En la paĝaroj “Ural-Siberia Esperantista Movado” <http://ural-sib.org/eo> kaj “REU.RU” <http://reu.ru/> estas afiŝita Unua informletero pri la Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburgo kaj reta aliĝilo. La organiza grupo invitas al la lingvistudado en Jekaterinburgo ĉiujn

esperantistojn, dezirantajn pasigi tri novembrajn festajn tagojn en la esperantista medio kaj aktive ekzerciĝi por perfektigi siajn parolkapablojn kaj aktivigi lingvokonojn. Spertaj instruistoj kaj kursgvidantoj jam anoncis sin; nun estas kompilata provizora studprogramo kaj leciontabeloj. Vizitu la paĝarojn kaj anticipu planu viajn novembrajn feriojn. Aliĝu al la Aŭtuna lingvotrejnado. Aliĝrabaton havas infanoj, studentoj, pensiuloj kaj membroj de REU.

Moto de la Aŭtuna lingvotrejnado: *“Halti survoje al alto signifas regliti”* (Nikolao Kurzens).

Vladimir Opletajev

Provizora leciontabelo de la B-nivela grupo.

№	Dato	Tempo	Instruisto	Temo de la leciono	Celoj de la leciono	Evoluigataj parolkapabloj
1	4.11	15:00 - 15:45 45 min.	Darja Zelenina (Ĉelabinsko)	Interkona leciono “Ni konatiĝu!”	Interkonatigi kursanojn kaj paroligi ilin pri ĉiutagaj temoj (familio, laboro, ŝatokupoj ktp.), krei senĝenan etoson en la grupo.	Parolado kontinua kaj interaga.

2	4.11	16:00 - 17:00 60 min.	Vladimir Opletajev (Surguto)	Parolu bele kaj akurate!	Atentigi kursanojn pri tipaj prononcaj eraroj de rusiaj Esperanto-parolantoj.	Normoj de la Esperanta prononco.
3	4.11	17:15 – 18:00 45 min.	Roman Jefremov (Glazovo)	Inteleka kaj lingva ludo “Ĉies ludo” (“Своя игра”), unua raŭndo	Evoluigi aŭskult- kaj leg-kapablojn, plivastigi intelektan horizonton de partoprenantoj.	Aŭskultado, legado.
4	5.11	9:00 – 9:45 45 min.	Roman Jefremov (Glazovo)	Inteleka kaj lingva ludo “Ĉies ludo” (“Своя игра”), dua raŭndo	Evoluigi aŭskult- kaj leg-kapablojn, plivastigi intelektan horizonton de partoprenantoj.	Aŭskultado, legado.
5	5.11	10:00 – 11:00 60 min.	Darja Zelenina (Ĉelabinsko)	Tatuoj kaj korpaj traboradoj	Paroligi kursanojn, atentigi ilin pri etiketo kaj bonaj manieroj en Esperanto; aktivigi vortostokon pri korpo kaj korpaj ornamaĵoj; praktiki modajn helpverbojn kaj volitivon.	Interaga parolado, legado.
6	5.11	11:15 – 12:00 45 min.	Vladimir Opletajev (Surguto)	Aŭskultu atente kaj komprenu kantojn	Aŭskultigi kaj komprenigi kursanojn pri bardaj kantoj en Esperanto; ekzerci ilin pri la interpretado de aŭskultitaj kantotekstoj.	Aŭskultado de muzikaj verkoj (kantoj en Esperanto).
7	5.11	12:15 – 13:00 45 min.	Darja Zelenina (Ĉelabinsko)	Posedo de hejmbestoj	Paroligi kursanojn per debatoj; organizi inter ili partneran kunlaboron.	Kontinua kaj interaga paroladoj.
8	5.11	14:00 – 14:45 45 min.	Vladimir Opletajev (Surguto)	Esperanto-Sumoo	Konatigi kursanojn kun la Internacia konkurso de legantoj en Esperanto; instigi kursanojn al la partopreno en la Esperanto-Sumoo.	Parolado; verkado de pragmata teksto (aliĝilo).
9	5.11	15:00 – 16:00 60 min.	Roman Jefremov (Glazovo)	Lingva societa ludo “Pentristo”	Evoluigi aŭskultkapablon, plivastigi vortprovizon de partoprenantoj.	Parolado interaga, aŭskultado.

10	5.11	16:15 – 17:00 45 min.	Darja Zelenina (Ĉelabinsko)	La Gazeto de la Aŭtuna Lingvotrejnado	Praktiki verkadon de diversstilaj tekstoj, kontinuan kaj interagan paroladon en intergrupa aktivado.	Verkado, legado, interaga parolado.
11	5.11	17:15 – 18:00 46 min.	Roman Jefremov (Glazovo)	Intelekta kaj lingva ludo “Ĉies ludo” (“Своя игра”), tria raŭndo	Evoluigi aŭskult- kaj leg-kapablojn, plivastigi intelektan horizonton de partoprenantoj.	Aŭskultado, legado.
12	6.11	9:00 – 9:45 45 min.	Vladimir Opletajev (Surguto)	“Puŝkin kaj la ĉefguvernisto”	Praktiki legadon de anekdoto kun plena / totala kompreno de la enhavo. (Antaŭtasko por kursanoj)	Legado.
13	6.11	10:00 – 10:45 45 min.	Darja Zelenina (Ĉelabinsko)	Arto de ŝercoj	Paroligi kursanojn kaj atentigi ilin pri la uzo de artikoloj.	Parolado kontinua kaj interaga; verkado de ŝercoj.
14	6.11	11:00 – 11:45 45 min.	Roman Jefremov (Glazovo)	Lingva societa ludo “Difektita telefono”	Monologforme paroligi kursanojn, evoluigi ilian aŭskultkapablon.	Parolado monologa, aŭskultado

45 min. – daŭro de lecionoj

x – bezonataj instruhelpiloj: komputilo kaj projekciilo

xx – hejma antaŭtasko por kursanoj

Klubo de instruistoj

Nova rubriko

Karaj geamikoj, en la “Bulteno de REU” sub la titolo “Klubo de instruistoj” estas lanĉata nova rubriko, kiu celas kontaktigi instruemajn esperantistojn de nia lando.

Estas evidenta fakto, ke ne ĉiuj perantoj de Esperanto posedas instruistan diplomon kaj ne estas trejnataj instruistoj, ke multaj ekster profesia instruista kampo sukcese kaj daŭre instruas Esperanton, akumulante interesajn kaj valorajn spertojn. Kvankam titolo la rubriko nomiĝas “Klubo de instruistoj”, fakte ĝi bonvenigas al kunlaboro kaj spertintersanĝoj krom profesiajn instruistojn, ankaŭ kursgvidantojn, instruemajn esperantistojn, estrojn de esperantistaj kluboj, grupoj kaj rondetoj ktp. Mi esperas kontinuan kunlaboron kun asociitaj kaj individuaj membroj de REU, sed mi ankaŭ bonvenige salutas homojn dume ne aliĝintajn al la Unio sed dezirantajn informi kaj fakule konsulti ĉiujn legantojn de la Bulteno.

La instruado estas krea tempo-kaj fortraba laboro, posedanta multajn facetojn, ligitajn kun lingvodidaktiko, metodiko, psikologio kaj edukado, sekve la spektro de materialoj, aperigotaj en la rubriko, estas neniel limigata enhance kaj teme: informoj pri aktualaj kursoj, apartaj interesaj lecionoj kaj originalaj instrumentoj kaj procederoj, intervjuoj kun instruantoj de Esperanto, artikoloj kaj noticoj pri fakaj instru-metodikaj temoj, recenzoj de lernolibroj, prezento de aŭtoraj kursoj kaj instruprogramoj, rakontoj pri interesaj instruaj kaj edukaj aranĝoj ktp. Unuvorte, ni celas reale prezenti ampleksajn tavolojn de la instru-eduka laboro, kiun ĉiujare plenumas dekoj da aktivaj kaj fervoraj esperantistoj en multaj lokoj de Rusio.

Plie, mi deziras, ke ĉiuj publikaĵoj ne nur trafu arkivan kaj kronikan dosierujojn, kio cetere tre gravas, sed ili iĝu ankaŭ apertaj instruiloj por tiuj, kiuj pretas kaj emas adopti tute novajn kaj originalajn aŭ jam bone aprobitajn spertojn.

Fine mi turnas min al la kolegoj – instruistoj kaj instruantoj de Esperanto, dezirante al ĉiuj novajn aŭdacajn planojn kaj multajn sukcesojn en la komenciĝinta instrusezono. Ni kuspas la manikojn kaj eklaboru! Nin atendas dekoj da scivolaj lernantoj de Esperanto.

Kontakta adreso: surborde@mail.ru

Vladimir Opletajev, membro de la REU-Estraro

Esperanto-instruistoj de Rusio

Aleksandr Blinov

Naskiĝjaro: 1969

Jaro de esperantistiĝo: 1986

Loĝloko: Ĉeboksaro, Ĉuvaŝio

Profesio: diplomita edukisto - instruisto, trejnita lingvoinstruisto, Cseh-instruisto, kiel komerca direktoro laboras en privata lernejo de fremdaj lingvoj, en kiu Esperanto estas unu el elekteblaj lingvoj.

Preferataj aŭ plejofte aplikataj instrumentoj en la kursoj de Esperanto: miksita, rekta metodoj.

Esperantlingva kvalifiko: KER-ekzameno – C.

Instruspertoj: instruado de Esperanto en la privata lingva lernejo "Jazik dla Uspěha" ("Lingvo por kariero").

Aktuala kurso: en ĉi tiu instrusezono (2017 – 2018) estas gvidata libervole elektebla baza kurso por deko da 10-14-jaraĝaj infanoj.

Krom ĉiujare instrui Esperanton, Aleksandr multon faras kaj entreprenas por praktike apliki ĝin kiel pontolingvon en la eksteresperantista medio, ekzemple, organizante Lingvajn Festivalojn en Ĉeboksaro aŭ Ĉuvaŝan Someran Tendaron "Ĥaval".

* * *

Mi skribas nome de la organizantoj de la Ĉuvaŝa Somera Tendaro. Temas pri unu-semajna aranĝo, okazanta jam ok jarojn en la komenco de julio, kie homoj lernas la ĉuvaŝan (laŭ diversaj niveloj kaj aĝogrupoj), aŭskultas amaseton da prelegoj, kantas k.a. Okazas ankaŭ kunvenoj de aktivuloj ktp. La enhavo kaj etoso tre similas al esperanto-aranĝo, eble ĉar la ĉefa organizanto estas mem aktiva esperantisto kaj plukas el sia sperto. La nombro de tut-semajnaj partoprenantoj en la tendaro estas ĉ. 30, kaj laŭlonge de la tuta aranĝo - ĉ. 70-80. La aĝo de la partoprenantoj iras de kelkmonataj infanoj ĝis 80-jaruloj. Multas familioj kun infanoj kaj studentoj. Ĝi okazas en ripozejo apud la rivero Sār/Sura (granda alfluanto de Volgo). Loĝkondiĉoj estas diversaj: eblas tendumi aŭ loĝi en hoteleca ĉambro laŭ diversaj gradoj de komforto (tamen senlukse).

La prelegoj ĉefe rilatas al aspektoj de la kulturo kaj historio de la ĉuvaŝoj kaj ankaŭ de najbaraj popoloj. La organizantoj aparte bonvenigas prelegojn pri minoritataj lingvoj kaj spertoj pri lingvoaktivismo kaj lingvopolitiko. Tiucele, ili aparte bonvenigus esperantistojn prelegantajn pri (siaj) minoritataj lingvoj. Kvankam prelegoj kutime okazas en la ĉuvaŝa aŭ la rusa, ankaŭ aliaj lingvoj estas foje uzataj, i.a. Esperanto (okazas fraz-post-fraza traduko al la rusa aŭ ĉuvaŝa). Ĉi-jare ni ekzemple aŭskultis prelegon en Esperanto pri unu el la rjukju-aj lingvoj en Japanio.

Aldona aranĝo pri (ne nur) minoritataj lingvoj okazanta en Ĉuvaŝio estas la Lingva Festivalo. Temas pri tradicia lingvofestivalo ĉiujare organizata de esperantistoj jam de pli ol 20 jaroj. En ĝi ĉiujare partoprenas pluraj centoj da homoj (ĉefe lernejoj kaj studentoj), kiuj dum unu aŭ du tagoj aŭskultas 45-minutajn prezentojn pri 30-40 lingvoj, inkluzive kompreneble de Esperanto. Kutime la aranĝo okazas la antaŭlasta semajnfino de oktobro. Ege bonvenas ankaŭ ĉi tie esperantistoj, prelegantaj pri siaj denaskaj lingvoj (aŭ pri konataj de ili minoritataj lingvoj).

Hèctor Alòis i Font (Katalunio), partoprenanto de la tendaro "Ĥaval"



DEFENDU ESPERANTON EN VIA REGIONO!

Regiona Agado: celoj kaj planado

Kiel organizi regionan agadon (RA) kaj interregionan kunagadon en Rusio?

Por respondi la demandon necesas kompreni, kio estas la nuntempa stato de Esperanta agado en Rusio. Ĉu ĝi ĝenerale ekzistas? Ĉu ni rajtas diri pri organizita esperantista movado en nia lando, se dum jarcentkvarono rimarkeblas nur splitoj de la glora sovetia Esperantujo? Kaj ĉu la nuna celo de RA estas kolektado de tiuj splitoj? Aŭ tamen ekzistas iuj dormantaj fortoj, nur atendantaj la alvokon de klariono por vice ekmarŝi sub la verdan standardon de unuigita Rusia Esperantujo? Ni devas ekkredi, ke tiuj fortoj estas. Ni devas trovi ilin. Aŭ krei. Aliokaze post deko da jaroj de la rusia Esperanto-movado restos nur belaj literaturaĵoj kaj rememoroj de pranepoj pri naivaj hobiaj de la esperantaj praavoj.

Jen la taskoj, kolegoj. Fakte: rekrei la Rusian Esperantujon, enspiri en ĝin novan vivon.

Por tio bezonatas sindonaj entuziastoj. Kaj efortuloj. Ĉiuj, kiuj konscias la dramecon de la situacio kaj ĉiuj, kiuj simple pretas fari ion ajn utilan por la progreso de la afero – sendepende de ajna membreco aŭ lingva posedo.

Nia giganta lando estas disdividita je ok regionoj de agado: Centra, For-Orienta, Nord-Kaukazia, Nord-Okcidenta, Siberia, Suda, Urala, Volgia. Ĉiu regiono devas havi sian estron – la regionan kunordiganton, tra kiu venados al la regiono konsila kaj morala helpo de la REU-Estraro. La regionoj draste diferencas unu de la alia – kaj iliaj vojoj al la kreo de la loka Esperantujo estos plej diversaj.

Mi kiel REU-respondeculo pri la RA jene vidas la celojn de nia laboro:

- riveli ekzistantajn esperantistojn kaj potencialajn aktivulojn en ĉiu agadregiono;
- inspiri la regionajn esperantistojn al Esperanto-agado kaj helpi al ili trovi konvenajn agadkampojn;

- helpi al regionaj esperantistoj realigi iliajn agadintencojn;

- starigi laborajn ligojn kaj eventuale kunagadojn de la regionoj inter si kaj kun REU.

Pli detale pri la labordirektoj kaj pri konkreta helpo al la regionoj ni traktos aparte kun ĉiu regiona kunordiganto. Kompreneble, ĉiu regiono havos diferencon de la aliaj agadplanon. Neniu “socialisma konkurado”! Estimo kaj subteno eĉ al la plej etaj faroj!

Sed kio pri la laborplano de REU pri RA? Ĝi ne estas kompilebla sen la proponoj de la regionaj kunordigantoj. Tial mi povas prezenti nur miajn proprajn intencojn, rilatajn al RA. Tiuj estas la jenaj:

- trovo de RA-kunordigantoj por 8 regionoj de Rusia Esperantujo (kune kun la regionaj esperantistoj);

- kompilado de la RA-laborplanoj (kune kun la regionaj kunordigantoj);

- ellaboro de organizaj materialoj, pridiskuto de tiuj en la REU-Estraro, diskonigo al la celgrupoj tra la lando (kune kun la REU-Estraro);

- organizo kaj okazigo de agado de la Moskva Esperanto-Asocio MASI kiel ekzemplo de lokaj aktivadoj (kune kun MEA MASI);

- eldonado de “Mia MASI” - la ĉiumonata Informfoliaro de MEA MASI, prilumanta la sperton de tiu ĉi organizaĵo kaj enhavanta komentojn por ajnloka RA (kune kun MEA MASI);

- preparo kaj okazigo de AMO-Seminario (kune kun la REU-Estraro, MEA MASI, regionaj kunordigantoj, ĉiuj aktivemuloj);

- raportado al REU-Estraro kaj al REU-membroj pri la farita laboro.

Ĉiu rusiano, kiu legas tiun tekston, estas esperantisto. Ĉiu apartenas al iu el la ok rusiaj agadregionoj. Kion vi scias pri Esperanto en via regiono? Kiujn realajn vojojn por progresigi Esperanton en via regiono vi vidas? Kiun vi rekomendas por la regiona kunordiganto? Eble, vi mem pretas akcepti la defion!

Irina Gončarova, REU-Estraro pri Regiona Agado mirinda.strigo@gmail.com

Publikaj prelegoj estas nia ŝanco

Informado – jen estas la pinta temo de septembro! Ja ekas nova lernoĵaro, kaj indas startigi Esperanto-kursojn. Sed kiun instrui? Ofte oni demandas min, kie mi prenas lernantojn. Mi respondas: per anoncoj en interreto... Jes, vere. Sed tiu respondo preteratentas la gravan momenton. Se vi anoncas kurson, preskaŭ certe venos neniuj – ĉar la alvoko celas E-lernemulojn. Tiuj ne abundas. Mi eĉ diru: tiujn necesas krei. Tial mi invitas homojn ne por la kursoj, sed por la senpagaj prelegoj pri Esperanto. Ĉi-jare la temo de tri el kvar miaj septembraj prelegoj estis: “Грамматический эскиз: эсперанто – это просто и весело” (Gramatika skizo: Esperanto estas simpla kaj ĝoja). Ene de tiu ĉi temo mia defio estas inspiri la vizitintojn lerni la lingvon. Kaj nur fine de la renkontiĝo mi invitas al senpaga malferma unua leciono. Ĉu la publikaj prelegoj garantias kolekton de la grupo? Tute ne. Povas veni kelkdek scivolemuloj, ne interesiĝantaj pri lernado. Kiel agiti ilin aliĝi al la kurso estas aparta temo. Sed ajnokaze antaŭ vi estas la taŭga publiko – kiu venis por vin aŭskulti kaj paroli kun vi pri la anoncita temo. Ni semas kaj semas... El iuj semoj iu lernonto iam povos elkreski. Publikaj prelegoj estas nia ŝanco. Kion necesas firme memori? Neniuj penoj estas vanaj! Sendepende de la rezulto estas via sperto, el kiu vi lernas agi pli ĝuste. Ni certe scias, sed tamen dum niaj agoj ni foje neglektas iujn banalaĵojn, ekzemple, ke necesas – uzi lokajn junularajn interretresursojn por la anoncoj, speciale anoncojn pri senpagaj klerigaj prelegoj; eĉ se neniuj venis – iu eksciis el via anonco, ke ekzistas Esperanto; – elpaŝi en ejoj, vizitataj de gejunuloj; eĉ se neniuj venos – tie estis anonco pri Esperanto; se iu venas – aliaj vidas vin rakonti pri Esperanto; – ne malĝoji, se iu venas, sed ne aliĝas al la kurso: li/ŝi poste povos informi aliajn aŭ reveni mem – emfazi dum la prelego la logikecon de la gramatiko kaj rapidecon de lernado – preni kontaktojn de la vizitintoj kaj disdoni la siajn. Sciu: publikaj renkontiĝoj estas nia ŝanco! Ĉi-septembre mi okazigis kvar: *La 6-a de septembro, merkredo, 16:00- 17:00, Moskva Internacia Libra Ekspozicio-Foiro, VDNĤ;*

La 13-an de septembro, merkredo, 19:00- 21:00, Biblioteko №10;

La 14-an de septembro, ĵaŭdo, 19:30-21:00, libra brokantejo “Locus Solus”;

La 16-an de septembro, sabato, 16:00-18:00, libra vendejo-prelegejo “Ĉitalkafe”.

Irina Gonĉarova,

Fonto: http://miamasi.weebly.com/uploads/1/1/0/9/110968997/mia-masi-2017-2_sept_.pdf

Informado

Sub kuŝantan ŝtonon akvo ne fluas

Prelego pri Esperanto en la Moskva Internacia Libra Ekspozicio-Foiro

La 6-an de septembro en Moskvo, en la grandega 75-a pavilono de VDNĤ, startis la 30-a Moskva Internacia Libra Ekspozicio-Foiro. La organizantoj de la Festivalo de literaturoj de la popoloj de Rusio invitis min rakonti pri la programeroj de la Moskvaj lingvaj festivaloj, ligitaj kun la popoloj de Rusio. Mi avertis, ke mi estas esperantisto kaj min ĉefe interesas popularigo de Esperanto, do, mi traktos la temon de tiu vidpunkto. Ili konsentis. Mencio pri mia prelego aperis en la programo de la Festivalo jene: “Lingvoj de popoloj de Rusio. – Irina Gonĉarova, direktoro de Moskvaj lingvaj festivaloj”. Kompreneble, tiu titolo neniel povas allogi interesiĝantojn pri Esperanto. Sed mi ne rifuzis. Elpaŝi en tiom granda aranĝo estas nova sperto – kaj kial ne provi? Sub kuŝantan ŝtonon akvo ne fluas. Kiel mi enplektis en la temon Esperanton? Mi apogis min al la tezo, ke Esperanto estas la dua lingvo, post la gepatra, rakontis pri Zamenhof kaj la interna ideo, pri kiel kaj kial Denis Keef venis al la koncepto de la festivalo kaj kiel ĝin rekapitis Aleksandr Blinov, kiu poste iĝis nacilingva aktivisto, prilumis la ideojn de la lingva aktivismo surbaze de la LF-prelegoj de Artjimi Fedorinĉik, ĉiam emfazante, ke kaj organizantoj de la lingvaj festivaloj, kaj la lingvaj aktivuloj estas esperantistoj. Do, la ruĝa fadeno de la prelego estis Esperanta.

Malgraŭ tute maltaŭga placeto por prezenti ion ajn, kiu estis destinita por la festivalo de rusiaj naciaj literaturoj, mian prelegon aŭskultis pli ol deko da homoj (ŝajne, rekorda kvanto da aŭskultantoj por tiu ĉi magra aranĝo). Al invitataj de mi esperantistoj aliĝis kelkaj naciaj prelegontoj kaj ĉiuj tri organizantinoj.

Allogiĝis ankaŭ hazardaj preterpasantoj. Inter tiuj estis Jelena Voronova - la ĵurnalistino de “Argumentoj kaj Faktaj”, kiu kun scivolemo aŭskultis min kaj post mia elpaŝo venis al mi por intervjui. Poste ŝi sendis al mi la artikolon, dediĉitan nur al mia prelego – ŝajne, por ŝi tiu estis la ĉefa impresado de la ĉu ekspozicia, ĉu la festivala observado. La artikolon mi multe korektis, pli emfazante la Esperantan temaron. Se Jelena kaj ŝia ĉefredaktoro akceptos ĉiujn miajn aldonaĵojn, ni havos fakte artikolon pri Esperanto en la plej granda rusia ĉiusemajna soci-politika ĵurnalo. La artikolo kun la titolo “Ni parolu en unu lingvo” (“Поговорим на одном языке”) devas aperi la 27-an de septembro, merkredo, en la enmetaj-suplemento “StoLiĉnost”. El la ekspoziciaj impresoj menciindas ankaŭ mia tre perspektiva konatiĝo kun Julia Sozina – la gvidanto de la Centro de slavaj kulturoj, antaŭ duonjaro ekfunkciinta en Moskvo. Ni multe kaj fruktodone parolis, Julia scias, ke Esperanto en multaj slavaj landoj estas populara kaj pretas trakti pri kunlaboro en kadre de la Centro kun slavaj esperantistoj de Eŭropo. Dank’al niaj kun Markus intereso al bildkartoj ni venis al iuj bildkarteldonistoj – kaj hazarde konatiĝis kun malnova moskva esperantistino Ksenija Zuboreva, nun loĝanta en Sankt-Peterburgo. Ŝi surprizis min, demandinte: “Ĉu vi parolas Esperante?”. Evidentiĝis, ke ŝi ekvidis sur mia vesto la MASI-insignon “Mi parolas Esperante”. Ni flue paroladis Esperante, poste ŝi bele por ni kantis. Vidu – kiom da neatenditaj rezultoj – nur de unu tago, ŝajna tute senperspektiva por Esperanto!



Irina Gonĉarova

Fonto: http://miamasi.weebly.com/uploads/1/1/0/9/110968997/mia-masi-2017-2_sept_.pdf



Jubileo

Eldonejo Impeto 25-jariĝis

Eldonejo “Impeto” aperis en 1992 surbaze de la agado pri eldonado de esperantlingvaj libroj fare de granda eldonejo “Progreso”. La nomo estis heredita de la almanako (2 numeroj), kiun eldonis “Progreso” en 1989 kaj 1991. Ĉio okazis dank’ al entuziasmo de elstaraj esperantistoj Aleksandro Ŝevĉenko (13.09.1957-24.11.2012) kaj lia edzino Lena (07.11.1963-05.09.2015). Ili sukcesis organizi plene profesion eldonadon de Esperantaj libroj, da kiuj

aperis pli ol 150 (proksimume duono da tiuj, kiuj estis eldonitaj de ili entute). Sen tiu agado apenaŭ la mondo konatiĝus kun verkoj de pluraj aŭtoroj... Estis entreprenitaj grandaj projektoj, kiel, ekzemple, eldono de serio da verkoj de fratoj Strugackij, serio de sciencopopularaj libroj “Familia biblioteko” ka.

Post forpaso de la fondintoj ilian agadon sukcese daŭrigas ilia filo Dmitrij Ŝevĉenko kaj la bofilino Anna Striganova. Okaze de la jubileo estis aparta prezento dum RET-2017 kaj speciala aranĝo – la **10-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo (MER-10)** hejme de Dima kaj Anjo, kiun ĉeestis diversaj esperantistoj. Estis riĉa programo kaj varmaj gratuloj (i.a., de la nomo de REU).

Ni ĉiuj deziru al la eldonistoj (kiuj ja samtempe estas redaktoroj de la revuo “Esperanto”) pliajn sukcesojn kaj daŭrigon de ilia, tiom necesa por nia komunumo, agado!





**Elena kaj Aleksandro Ŝevĉenkoj –
fondintoj de Impeto.**

**Ĝus, la 13-an de septembro, okazis
ankaŭ persona jubileo de Saŝa –
lia 60-jariĝo.**

14.10.17 plenumiĝas 90 jaroj post la naskiĝo de Boris Tokarev = Bonifatio Tornado

Boris Tokarev estis figuro en la vivo kaj nia movado multflanka. Esperantisto, kiu aliĝis al la lingvo en la unua postmilita (postfestivala) ondo fine de 1950-aj, ekaktivinte en la Moskva E-klubo “Fajrero”, li tuj fariĝis arda adepto de la E-kulturo, kaj komencis “eldoni” (kompili, tajpi) la beletran (ĉefe poezian) revueton kun la sama titolo “Fajrero” – ŝajnas, ĝi estis la unua “samizdata” E-eldonaĵo de tiu tempo. Jam ekde la komenco vekigis lia krea talento – li tradukis poemojn – el la plej ŝatata lia rusa poeto Lermontov (kies poezion li opiniis pli alta, ol tiu ĉiuj aliaj poetoj, ankaŭ de Puŝkin), “Eposo pri militiro de Igor”... Kaj konstante aperadis ĉiam pli da liaj originalaj poemoj, kiuj poste konsistigis kolekton “Gutoj falantaj”.

Decidinte verki facilan romaneton por komencantoj, kiu estu teksto por lernilo, li forlogiĝis pro la krea teksto kaj rezultis ĉarma fantasta romano “Ardes” (Ardes estis ankaŭ lia unua literatura pseŭdonimo). Sekvis granda laboro pri epopeo “Vivo de Prometeo, enhavanta pli ol 10 000 versojn. Krome, li laboris en fabla ĝenro, kaj en kelkaj liaj fabeloj oni rekonas pesonojn kaj realaĵojn el la tiama movada vivo. Fine de la 1980-aj jaroj li faris grandan laboron pri traduko de la persa klasika poeto Rudaki.

Cetere, li ĉiam ripetadis, ke li ne estas poeto: poezion verkas “lia amiko” Bonifatio (Бонифатий Васильевич) Tornado, por kiu li eĉ elpensis fikcian biografion. Eble tiel estis – kreante, li kvazaŭ transformiĝis je alia persono, kaj tiu nomo estis ne simpla pseŭdonimo, sed nomo de lia *alter ego*.

Ŝatante la Esperantan literaturon, li sukcesis kolekti grandan bibliotekon de esperantlingvaj libroj (li volonte donadis el ĝi librojn por legi), kaj faris seriozajn literatuologiajn esplorojn. Rezultis granda monografio en la rusa (kun esperantlingvaj citaĵoj) “Historio de Esperanta literaturo dum 100 jaroj” – ĝi neniam estis eldonita, tamen ties ĉapitroj li legis kiel prelegojn en Moskva Centra E-Klubo fine de 1980-aj jaroj, kio havis grandegan klerigan signifon. Mi, persone, ricevis la sistemajn sciojn pri la temo dank’ al tiuj prelegoj kaj pruntitaj de li libroj... Liaj plej ŝatataj Esperanto-poetoj kaj movadanoj estis Nikolao Hohlov, Deorgo Deŝkin kaj Alesandr Saĥarov, kies vivojn li esploris. La bibliotekon li, laŭ ekzemplo de A. Saĥarov,



testamentis al la Moskva Fremdlingva Biblioteko, kaj ĝi daŭre servos al la interesitaj esperantistoj.

Al la sfero de liaj interesoj apartenis ankaŭ historio de religio kaj deveno de kristanismo. Liaj artikoloj-prelegoj pri la temo, eble, ie restis en la hejma arkivo. Rilate al religio li havis iun specialan vidpunkton: ĉiam asertis, ke li ne estas ateisto (sed “ajnisto”), kaj kredas ne je iu dio, sed je la homo.

Kio krome? Nu, li iom scipovis ludi pianon kaj gitaron kaj klasikmaniere kantis.

Tokarev estis aktiva instruisto de Esperanto. Al instruado li rilatis tre serioze, profunde studadis ĉiujn teoriojn kaj praktikajn metodojn. Plej longe kaj serioze li instruis Esperanton sur ĉiuj nivelo al blinduloj, kaj alta nivelo de la Moskva klubo de blindaj esperantistoj en 1970-aj-80-aj jaroj signife ŝuldis al lia agado. Li povis legi kaj skribi brajle, kio multe helpis tiun instruadon.

Kiel eminenta instruisto kaj kulturscianto, li, kune kun Boris Kolker, iniciatis kreon de Ĉefa Atesta Komisiono de SEU (poste – REU) kaj ellaboris la unuajn ekzamenprogramojn por ĝi.

Li estis esperantisto, sed ja li estis profesie kemiisto (kiel li diris ŝerce: «А в миру я химик»), kandidato de kemiaj sciencoj, docento de Forstista Akademio kaj Moskva Kemia-Teknologia Instituto D.I.Mendelejev. Li interesiĝis pri diversaj problemoj, ligitaj kun ĝeneralaj demandoj de kemio, i.a. pri origino de la vivo. Plurajn artikolojn pri kemio li publikigis en Esperanto en “Scienca Revuo”. Estis supozo, ke lia malbonfarto dum lastaj vivojaroj kaj frua forpaso ŝuldas al veneniĝi de iuj reagiloj dum eksperimentoj.

Mortis li 17.11.1994. Lia publikigita libro- kaj broŝurforma heredaĵo konsistas el 6 eroj:

Psikologio kaj metodiko de Esperanto-instruado: (Gvidilo por Esperanto-instruisto). 1984

Versoj. Ĥarkovo : UkrEA, Literatura Tradukista Komisiono ;1991

Rudaki, Abu-Abdallah , Versoj. Traduko de B.Tokarev. Duŝanbe : Ĉefa Scienca Redakcio de Taĝikia Soveta Enciklopedio ;1991

Ardes: originala romano en Esperanto. Moskvo: Impeto;1996

Vivo de Prometeo. Moskvo: Impeto;1996

Lermontov, Mihail. Mcyri: poemo. Traduko de B. Tokarev, Moskvo: Eŭropa Jura Universitato JUSTO; 1999

Nikolao Gudskov

LA HOMO

Bonifatio Tornado

Mi estas besteto, subtila kaj febla,
kun timo senĉesa, konstanta singard’;
kaj ĉiam danĝeron supozas mi ebla,
streĉiĝas timeme pro fremda rigard’.

Mi estas la drako, multkapa, kruela,
teruron portanta al ĉiu estaĵ’,
fajregon sputanta la monstro fabela,
en certa kaj impertinenta kuraĝ’.

Mi estas la besto, sovaĝa, perfida,
kun mano prenema kaj akra dentar’,
envia rigard’: kun fervoro avida
mi kaptas kaj tenas en stulta avar’.

Mi estas la besto, ameme karesa,
mi ĝuas ŝin premi, rigardi sen fin’;
degelas volupte en vol’ sinforgesa
refande miksiĝi kun korpo de in’.

Mi estas la besto kuraĝa, fidela,
por idojn defendi de fremda atenc’;
sed tiom malica kaj tiom kruela,
al ĉiu fremdulo malforta sen senc’.

Mi estas formik’ laborema, senlaca,
portanta dekoble ol pezas mi mem;
en mia senfina serĉado – aŭdaca,
iranta la vojon kun plendoj kaj ĝem’.

Mi longe meditas, estante la sola,
sopiras, hezitas sen firma decid’;
senpense kun fluo mi iras popola,
kun sento amasa kaj blinda konfid’.

Kaj estas mi ero de multmiliono
pugno, potenco en la unuec’,
de l’ horo en la Univers’ unisona,
de la neskuebla rokego la pec’.

Jen – stranga aloj – de l’ homo esenco:
kaprice varia penetra imag’,
de l’ penso serĉanta senlima potenco,
kaj stulta kruelo de tuja reag’.

Ne estas malbono mi, nek la perfektejo;
nur karno pulsanta min gvidas laŭ ond’.
Mi estas – de l’ vivo hazarda elekto,
terura estaĵo, fiero de l’ mond’.

Al la 120-jariĝo de Pjotr Jefimoviĉ Astafjev (7.07.1897 – 23.01.1987)

Mia esperantista biografio



Ŝajne en marto de 1914 jaro en konata de mi pola familio mi ricevis donace libreton, eldonitan en Varsovio sub titolo «Д-р Эсперанто. Международный язык. Полный учебник для русских».

Mi jam sciis pri la ekzistado de tiu lingvo, ĉar antaŭ du jaroj mi legis artikolon pri ĝi en tiam populara revuo «Вестник знания» (“Heroldo de la Scio”), kaj ĝi vekis en mi grandan intereson. La donaco entuziasmigis por tuja lernado de tiu lingvo.

Baldaŭ mi konatiĝis kun la unuaj samaraj esperantistoj (A.Kolĉin kaj A.Ohitoviĉ, fervojaj oficistoj). Estis abonita de mi la revuo „La Ondo de Esperanto“ (Moskvo), akiritaj la unuaj libroj en la internacia lingvo, nome „Patroj kaj filoj“ de Turĝenev en traduko de fama esper. stilisto

K.Bein (Kabe) kaj „Princo Serebrjanij“ de A.K.Tolstoj en traduko de Ŝidlovskaja.

En la sama jaro eksplodis la Unua mondmilito kaj tio malhelpis la internacian korespondadon.

Tiam mi estis jam 17-jara knabo kaj pretiĝis, post specialaj ekzamenoj, fariĝi popola instruisto. Aŭtune mi ricevis la oficon en la regiono de Buguruslan.

La unuajn publikaĵojn, kiel esperantisto, en komencaj monatoj de 1918 jaro mi faris, kiam mi revenis post dujara militservo en Samaron. Sed en la fino de la jaro mi ree devis militservi. Nur en la fino de 1920 jaro, jam en Ĉitá, mi estis liberigita por civila laboro. Tie komenciĝis la dua periodo de mia plej aktiva agado.

Kune kun ĉitaaĵ esperantistaj aktivuloj (Kurbatov, Baĵenov kaj aliaj) mi partoprenis en la organiza laboro (prelegoj, kursoj). Sed ĝuste tiam komenciĝis mia aktiva literatura laboro en

kelkaj eldonaĵoj. En 1921 jaro unu literaturisto eldonis almanakon “Vortoj kaj makuloj” kun paralela traduko en esperanto. Krom ke ĉiuj versaĵoj en la almanako estis tradukitaj de mi, mi ricevis du paĝojn por miaj propraj originalaj verkoj en esperanto (poemo en prozo „La Nova Babelo“ kaj tri aŭ kvar versaĵoj). Poste alia eldonisto proponis al mi organizi esperantan fakon en lia nova belarta revuo “Voshod“.

Kun reveno al Samara (komenco de 1923 j.) mi ne plu pensis pri la verkado kaj tradukado, kvankam same, kiel en Ĉita, mi ricevis la oficon de teknika redaktoro komence en la sama profesia unuigo de poŝtoficejoj (monata bulteno “Voĉo de Ligilistoj”) kaj post du jaroj en la redakcio de “Voljskaja kommuna” (1925 – 1933). Se en la unuaj du jaroj en Samara mi povis organizi kaj gvidi kurson kaj laboron de la unua rondeto (ĉirkaŭ 40 anoj), nun, ĉar mia laboro estis dumnokta, kaj ĉio, kion mi povis fari por Esperanto, estis la organizo de la gubernia komitato kaj la koresponda grupo de laboristaj korespondantoj.

Por fini la noktan laboron en tipografiaj kondiĉoj mi ekŝiĝis el la eldono de “Voljskaja kommuna” kaj forveturis al Uljanovsk (la redakcio de “Proleta vojo”), poste en vilaĝon (en redakcio de Politotdel MTS“), kaj fine kiel sekretario en redakcio de «Степные известия» (Bolŝaja Gluŝica). Finfine en 1936 mi decidis reveni al instruista laboro (komence en Smiŝljajevka apud Kujbiŝev, poste, reveninte en fino de 1945 jaro el la armeo, en Kirovskij regiono de Kujbiŝev). Nur en 1957 jaro, kiam mi fariĝis pensiulo, mi dediĉis mian tutan liberan tempon por agado esperantista.

Tiam mi rekomencis ankaŭ la tradukan laboron el miaj plej amataj poetoj Puŝkin kaj Majakovskij. Tiam komenciĝis miaj kontaktoj kun aliaj samideanoj-tradukistoj kaj poetoj: G.Deŝkin (Miĉurinsk), J.Lubjanovskij (Ostrogojsk), A.Tolokoncev (Kostroma), N. Ŝtejnberg (Ĉernovci) kaj kelkaj aliaj.

La unua publikaĵo estis mia traduko el Puŝkin („Gabrieliado“). Poste en iaj revuoj ankoraŭ kelkaj tradukitaj versaĵoj.

El Majakovskij mi tradukadis preskaŭ ĉiujn liajn la plej popularajn poemojn kaj apartajn versaĵojn. Sed konscias, ke tiuj tradukoj por esti pli malpli kontentigaj postulas ankoraŭ pluan laboron super ili. Tial mi ne rapidas strebi la publikadon. Iom post iom mi esperas ankoraŭ korekti la malnetajn manuskriptojn.

P. Astafjev, Marto 1980 j.

SILENTIUM!

F. Tjutĉev

Silentu, kaŝu en latent’
Pri viaj revoj kaj pri sent’ !
En la animo restu brili
Kaj tie estingiĝu ili ,
Kiel stelar’ en firmament’
Admiru ilin – kaj silent’ !
Ĉu povas kor’ esprimi sin ?
Ĉu aliul’ komprenos vin ?
Kun via mensa vivosfero ?
Pens’ eldirita – jam malvero.
Malpuras font’ en formoment’ .
El ĝi vin nutru – kaj silent’ !
Do vivu en interna mond’ .
En ĝi boladas vasta ond’
Kaj pensoj sorĉaj kaj misteraj,
Blindigos ilin lum’ ekstera,
Disblovos ilin kruda vent’
Atentu ilin – kaj silent’ .

Tradukis Pjotr Astafjev

Mikaelo Giŝpling (10.01.1924 – 26.09.2017)



Forpasis Mikaelo Giŝpling. Li sukcesis travivi longan vivon, kelkajn periodojn de kiu li dediĉis al Esperanto. Esperantistiĝinte en 1943 aŭtodidakte li ne povis trovi la lingvan komunumon – des pli entuziasme li ekaktivis en 1957, partoprenante revivigon de la movado en Sovetio. Sed inter 1960 kaj 1990 li kabeis... kaj poste subite revenis. Revenis ne simple, sed kun kreema impeto (en la aĝo 65!) – komence li tradukis el la rusa poezio, sed baldaŭ aŭdacis ekverki originale – kaj tuj leviĝis al la nivelo de la plej elstaraj Esperanto-klasikuloj, kaj nun staras en la sama vico kun Baghy, Miĥalskij, Kalocsay, Auld, Boulton kaj aliaj granduloj. La lastaj 27 jaroj de sia vivo li konstante pruvadis, ke tiu loko en la Esperanto-literaturo estas plene merita. Li kaj lia poezio ĉiam mankos al ni. Kondolencojn al liaj proksimuloj!

Estraro de REU

La 26-an de septembro 2017 forpasis Mikaelo (Miĥail Jakovleviĉ) Giŝpling – elstara sovetia, rusia kaj israela esperantisto, eminenta poeto, tutmonde konata en Esperantujo. Mikaelo Giŝpling naskiĝis en la siberia urbo Irkutsk, ekde 1943 loĝis en Moskvo kaj studis en Moskva instituto de kemio. En la sama jaro li eklernis Esperanton aŭtodidakte laŭ la broŝuro de N. Kabanov, eldonita ankoraŭ en 1909, poste daŭrigis la lernadon per la lernolibro de A. Saharov. En 1957, kiam en Moskvo okazis Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj kaj estis preparata grupo de gejunuloj, kiuj povus partopreni en la koncertaj aranĝoj, Mikaelo Giŝpling konatiĝis kun esperantistoj. Ekde tiam li aliĝis al aktiva agado, baldaŭ fondis junularan E-klubon “Fajrero” kaj fariĝis ĝia prezidanto. Ekde 1998 la poeto loĝis en Israelo.

Fine de la 1980–aj jaroj, jam meze de la sepa jardeko de sia vivo, Giŝpling komencis tradukadi ruslingvajn poemojn en Esperanton kaj en 1991 ekverkis originale. Liaj verkoj aperadis en la organo de Moskva Literatura Esperanto – klubo “Cerbe kaj Kore”, “Monato”, “Scienco kaj Kulturo”. En 2000 M. Giŝpling gajnis la unuan premion en Belartaj Konkursoj de UEA por la ciklo de poemoj “Neĝa fantazio”, kaj en 2004 samtempe la unuan kaj duan premiojn en la poezia branĉo de tiuj Konkursoj.

La unua poemaro de M. Giŝpling “El sisma zono” estis eldonita de Flandra Esperanto – Ligo en la serio “Stafeto” en 1994. William Auld eniĝis tiun libron en la liston de plej legindaj poeziaj kolektoj kaj skribis en la antaŭparolo por ĝi: “Jam delonge mi ne renkontis tian aŭtentikan lirikiston, tian versmajstron, kies fortaj rimoj kaj vortmuziko enkadrigas temojn vere trafajn kaj studindajn... Giŝpling estas poeto, kiu profitas el klasikaj normoj, sed alportas al ili frapan freŝecon”. La dua libro “Eola harpo” estis eldonita en 1999 en Moskvo de Eŭropa Jura Universitato Justo. La trian poemaron “Tie ĉi tie” denove eldonis Flandra Esperanto – Ligo en 2003 kaj la kvaran poemaron “Vespere” – la moskva eldonejo “Impeto” en 2008.

En la antaŭparolo al sia kvara poemaro la aŭtoro skribis: “Kaj denove - versaĵoj en Esperanto. Jen antaŭ vi kuŝas mia kvara poemaro. Ĉu ne sufiĉas? Oni jam diras al mi : ”por kio vi vane elspezas vian tempon kaj skribas en la lingvo, kiu havas la solan destinon – ĉiam resti sur vojrandoj de la tutmonda kulturo? Kial vi ne verkas en la rusa aŭ alia nacia lingvo? Esperanto estas efemera fenomeno kaj neeviteble pli – malpli baldaŭ malaperos”.

Spite al la vortoj de la kritikantoj, mi pensas, ke tiu ĉi “artefarita “ lingvo jam provas sian mirindan vivkapablecon dum multaj jaroj, kaj ĝia plua sorto, laŭ mia opinio, tute ne aspektas tiom malĝoja. Ĉi jare ni celebros ĝian 120-an datrevenon. Alivorte – Esperanto meritas kaj havos pli feliĉan estontecon. Krom tio, Esperanto jam delonge estas literatura lingvo. Ĝi permesas bone esprimi pensojn kaj sentojn de la homo, kaj pro tio verkado en Esperanto alportas plezuron al aŭtoro.”

Raja Kudrjavceva

Memore al M. Gispling jen kelkaj liaj poemoj:

La lingvo de Espero

Por kio versas mi en lingvo, kiun konas
Apenaŭ dudek mil stranguloj en la mond' ?
Kaj eĉ el tiu kvant' nur tre malvasta rond'
La poezion ŝatas kaj bezonas.

Verdire tio ĉi ne multe min afliktas.
Mi skribas ne por mend', sed sole por mi mem:
El maro de la viv' emerĝas nova tem'
Kaj tekston de poem' en tiu lingvo diktas.

Min logas tiu ĉi komuna idiomo –
La lingvo de esper' de Majstro Zamenhof.
Belsona, kiel flut', por poezia strof'
Kaj kuniganta homon kun la homo.

Kaj ne certigu min, ke l' celo estas mita,
Ke en la lingvo mem forestas ĉia senc',
Ke fakte estas ĝi nur revo, nur intenc',
Per kiuj la infer' jam estas pavimita.

Ligiĝis mia vers' al lingvo Esperanto.
Se ĝi ekzistos plu, do restos mia spur',
Se iam mortos ĝi, do mortos mia kanto...
Sed nun mi versu – juĝu la futur'.



* * *


Jam finiĝis miaj vagoj,
Ŝutas neĝon frostaj vintroj
Kaj forfluas miaj tagoj,
Kiel akvo inter fingroj.

Kaj vizitas min pli ofte
Dolĉa kaj malica tento,
Kiu flustras softe, softe
Pri trankvilo kaj silento.

Tamen post la pord' ekstera
Plue brilas, pulsas, bruas
La freneza mondo tera,
Kiu logas min kaj skuas.

Kaj mi tute malracie
Pretas pagi multekoste,
Nur por ke mi povu scii,
Kio do okazos poste.





ZEBRO-PASEJO

Striita estas mia voj',
Samkiel zebro,
Alternas ĝojo kaj malĝoj',
Kaj lum' – tenebro.

Sur hela strio dum la pas'
Nenio rajpas,
Kaj marŝas mi sen embaras'
Kaj gaje fajfas.


Apenaŭ tuŝas la pied'
Malhelan strion,
Envolvas min implika ret' –
Mi perdas ĉion.

Sed mi esperas, ke l' malbon'
Ne longe ĝenos,
Ĉar nepre post la nigra zon'
La blanka venos.

Nur se finfine per falĉil'
La Mort' eksvingos
Kaj lumon de l' ĉiela bril'
Por mi estingos,

Neniu helpos en ĉi foj',
Sed estu danka,
Se parton de l' irita voj'
Mi havis blanka!

Mi estas judo kaj samtempe ruso –
laŭ la deveno, trajtoj kaj eduko.
Mi ĉiam vivis inter du polusoj.
Mi estas ruso eble pli ol judo...
Sed la judeco estas peza ŝarĝo
Portata ĉie kaj en ĉiu aĝo.
Neniam estis mi indiferenta
Por la masakroj, moko kaj pogromoj
Kaŭzitaĵ de l' malamo intergenta,
Kaj dum pludaŭras tiu sanga ludo,
Mi malgraŭ ĉio volas esti judo!



Oni ankaŭ povas vidi la filmon “Ne simple poeto, sed al-kemia poeto” de Gian Piero Savio pri Mikaelo Giŝpling:

<https://vimeo.com/15003630>(link is external)

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 10.10.2017